

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2007 numero 3-a: julio-septembro



Fotis Claude Gacond

Sonia Bétrix-Koleva laboranta en CDELI kun sia interesata filo Nicolas. Ekde la komenco de la printempo ŝi zorgas pri la arkivado de la gazet-artikoloj, kiuj koncernas esperanton aŭ eĉ nur mencias ĝin.

En la rubriko CDELI legeblas raporto pri ŝia laboro.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,
Stefano Keller, Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2007-4 : oktobro-decembro :
septembre 15.

2008-1 : januaro-marto :
decembre 15.

2008-2 : aprilo-junio :
marto 15.

2007-3 : julio-septembro :
junie 15.

Konsultu la retejon de SES !

www.esperanto.to/ses

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
032 932 18 88.

Retpoŝto : mireille-grosjean@rpn.ch

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-
Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2007-3 - verkita de Stefano Keller

1.

**Gazetaraj
Komunikoj, aŭ:**

**kiel informi pri
Esperanto ?**

- a) "120 jaroj de
Esperanto",
b) "92a UK,
Jokohamo"

Congrès mondial sans interprètes

● **Esperanto.** Cette langue, créée pour faciliter la communication interethnique, fête ses 120 ans d'existence cette année. Le grand congrès mondial des espérantophones se déroule actuellement et jusqu'au 11

2.

**François
Grin:**




**«Kiu lingvo estas
vere natura?»**

« Estas tre dezirinde, ke la eldiroj de prof. Grin aperu en SES informas. Ili enhavas gravajn ideojn pri la estonteco de Esperanto. Ni ja ankaŭ argumentas simile, sed Grin estas profesoro kaj ne esperantisto. » skribis Bruno Graf, ekde longa tempo efika aktivulo de la svisa esperanto-movado, kiu demisiinta de sia estrarmembreco, plue helpas la aktualajn agantojn per konsiloj.

3.

**Iĝu delegito de
UEA !**

Malkreskis la svisa delegita reto. Legu la alvokon de la nova prezidanto de nia monda asocio, **Probal Daŝgupto** el Barato.



4.

**Radiostacioj, videoj,
gazetoj esperantaj**

5.

**Retpaĝoj de SES:
→ aktualiĝo**

6.

**Donacoj ricevitaj,
Novaj patronoj**



En la venonta numero de SES informas, ni aperigos la kongresajn impresojn de la kunprezidantoj de nia societo, kiuj ĉeestis la 92-an Universalan Kongreson de Esperanto en Jokohamo, 4-11.08.2007.

Por antaŭrigardo kaj legi la tagkurierojn, vi povas jam viziti jenan retpaĝon:
http://www.kontakto.info/Un_congres_mondial_sans_interpretes_a_Yokohama.html
kie troviĝas kelkaj fotoj de Dietrich Weidmann, kaj ligoj al retaj fotalbumoj pri la du grandaj kongresoj de la jaro.



1. Gazetaraj komunikoj de SES kaj de CDELI

Versajne la progreso de Esperanto, ĝia disvastiĝo, kiom kaj kia la homoj ĝin konas, dependas grandparte de la grado de malfermiteco de la movado. Ne temas pri tio, ke esperantistoj estus sekretemaj, sed ĉefe pri tio, ke ili plej ofte organizas eventojn nur por si kaj samtempe ne estas (aŭ ne sufiĉas) informado al ne-esperantistoj, eblo aliri la eventon, legi, sciiĝi pri tio.

Tutcerte helpus al la disvastiĝo de la internacia lingvo, al kreado de ĝusta bildo pri ĝi ĉe la eksteruloj, se okazus pluraj eventoj organizitaj de esperantistoj sed okazigitaj kadre de la ekstermovada publiko, kun eroj kompreneblaj ankaŭ de tiu.

Aliflanke, certe la plimulto de la esperantistoj ŝatas informi pri Esperanto, volas varbi por ĝi ĉiun eblan konaton en ĉiu ebla situacio. Tamen, oni devus esti bona informanto, kelkfoje iom pli silentema aŭ alistrategia, se oni ne volas krei malamikojn de la esperanto-movado.


Alia eblo informada estas la gazetaraj komunikoj. Ili malofte havas amasan pozitivan reagon flanke de la amaskomunikiloj, tamen ilia efiko estas ke okazas grandskala

informado kaj la redaktoroj al kutimiĝas legi pri Esperanto. Tiel ĝi ne plu aspektas al ili kuriozaĵo, pri kio oni aŭdas malofte, kaj kio ne vekas intereson pro antaŭjuĝoj, kaj la gazetaro ĝin klasigas nevalora por aperigo.

a) 120 jaroj de Esperanto

Laŭ iniciato de Andreas Künzli, aktivuloj pretigis kaj dissendis al la svisaj amaskomunikiloj gazetaran komunikon pri la 120-jariĝo de Esperanto. La germanan originalon de Andy francigis Stefano Keller, kies tradukon kontrolis Nancy Fontannaz kaj Claude Gacond. La italan version redaktis Tazio Carlevaro. Entute pli ol cent adresoj de svisaj redakcioj, ĵurnalistoj, radio kaj televidstacioj ricevis la mesaĝon kiun rete dissendis al la respektivaj lingvoregionoj: Andy, Tazio kaj Stefano. Krome kelkaj retaj anoncoj, blogoj ricevis, aperigis la informon pri tiu jubileo. Samtempe la komunikoj informis pri la enciklopedio Universalaj Lingvoj en Svislando, verkita de Andreas Künzli kaj eldonita de SES/CDELI en 2006. La teksto de la komunikoj estas legebla surrete:

www.kontakto.info/120_ans_Esperanto.html



Congrès mondial sans interprètes
• **Esperanto.** Cette langue, créée pour faciliter la communication interethnique, fête ses 120 ans d'existence cette année. Le grand congrès mondial des esperantophones se déroule actuellement et jusqu'au 11 août à Yokohama, au Japon. Plus de 2000 personnes des cinq continents, dont une délégation suisse, en provenance d'une soixantaine de pays, participent à cet événement.
→ www.uea.org

b) Tutmonda kongreso sen tradukistoj en Jokohamo

La alia komuniko informis la ĵurnalistojn pri la okazo de la du grandaj kongresoj de la jaro: la 63-a IJK en Hanojo kaj la 92-a UK en Jokohamo. La tekston redaktis en la franca Stefano kaj kontrolis ankaŭ tion Nancy kaj Claude. Tazio same denove akceptis la italigon, sed ne troviĝis volontulo por la germanigo de tiu dua komuniko. Jen, montriĝas, ke ne ĉiam eblas hazarde « kapti » iun, kiu akceptus fari la laboron***. Ankaŭ tiu komuniko iris al la jam utiligita centoj da adresoj kaj al kelkaj plie trovitaj.

Krome, ambaŭ komunikoj estis aperigitaj far' Stefano en la retaj forumoj, blogoj de kelkaj ĵurnaloj kaj en aliaj retejoj. Li pretigis ankaŭ retpaĝajn versiojn, kiujn vi povas viziti el la paĝo:

<http://www.kontakto.info/lingvoj.html>

La rezultoj:


- ĵurnalistoj kontaktis la aŭtoron de la enciklopedio, Andreas Künzli, por realigota intervjuo.

- ĵurnalistino telefonis al Claude Gacond por peti tradukon de 2 frazoj el la franca al Esperanto kaj antaŭvidis intervjuon kun li en CDELI.

- aperis mallonga informo en Le Matin Bleu la 7-an de aŭgusto, elprenita el la enhavo de ambaŭ komunikoj (vidu kopion sur la antaŭa paĝo).

Eble aperis ankaŭ aliloke artikoleto (surpapera) aŭ mencio pri la informoj de la komunikoj, sed ĝis nun neniu

sciigis nin pri tio. Fako estas tamen, ke almenaŭ Google «lernis» iom pli pri Esperanto. Ni petis retajn avertojn pri aperigitaj artikoloj, paĝoj en retejoj, enhavantaj la koncernajn ŝlosilvortojn. La avertoj de tiu plej grava serĉmaŝino pri niaj retaj publikaĵoj alvenis jam la sekvan tagon post la peto. Tiuj retaj versioj de niaj gazetaraj komunikoj enhavas plurajn ligojn al (pri)esperantaj retejoj kaj ankaŭ aliaj retejoj sendas vizitantojn al niaj komunikoj. Ekzemple la retejo de Andreas Künzli pri la internacia komunikado:



www.planlingvoj.ch resendas la vizitantojn al la komunikoj kaj ankaŭ al pluraj aliaj retejoj, retpaĝoj rilataj. En lia retejo oni povas trovi multajn ligojn al diverslingvaj retejoj, kiuj mencias la Enciklopedion. Sciigu al li, se vi malkovras plian.

Temas do pri sufiĉe granda laboro, farita de sindonema teameto. Ni ne devas forgesi, ke preskaŭ ĉiu en la esperanto-movado agas bonvole kaj nepagite. Samtempe oni devas plenumi sian ĉiutagan monproduktan aktivecon por vivteni sin kaj sian familion. Kaj do la tempo por Esperanto estas prenita el la samaj 24 horoj, kiuj estas je dispono de la koncernulo, laŭ la ebloj specifaj al

ĉiu opa aktivulo. Tiel, oni komprenas, ke ne ĉiam eblas hazarde trovi kunlaborpretan samideanon kaj tiel improvizi agadteamon. Tamen, ni devas daŭrigi tiun inform-agadon kunlabore kun Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann, kiuj tion faras jam de jaroj en la koncernaj lingvo-regionoj de Svislando. SES bezonas

reton de kunlaboremuloj, kiuj de tempo al tempo pretas akcepti taskon (ĉu traduki aŭ kontroli tradukaĵon, redakti tekston en sia lingvo aŭ en Esperanto, plenumi facilajn retajn taskojn, organize kunlabori aŭ deĵori ĉe manifestacioj aŭ alimaniere kunagi laŭ la diversaj bezonoj de aktualaj agadoj).

*** SES atendas sinproponon de kunlaborantoj el la kvar lingvoregionoj de Svislando, kiuj laŭokaze povus kunagi, helpi en diversaj agadoj. La celo estas: havigi al la svisa esperanta movado bonvolulan reton, kiu permesas al la diverslokaj aŭ tutsvisaj agadoj esti realigitaj optimume kaj sukcese.

Samtempe, la estraro de Svisa Esperanto-Societo dankas ĉiujn, kiuj jam ĝis nun pozitive reagis al niaj petoj tiurilataj kaj kunlaboris en la diversaj agadoj.

2. «Kiu lingvo estas vere natura?»



Profesoro François Grin pri la graveco de la angla kiel universala lingvo kaj pri la estonteco de Esperanto.

KOOPGAZETO: Kial planlingvoj ne povis venki?

FRANÇOIS GRIN: Bezonatus internacie kunordigita konvencio, kiel estis la kazo ĉe la transpreno de la metra sistemo. Tiu-ĉi taksatis kiel pli praktika kaj malpli kosta. La Ligo de Nacioj, antaŭa organizo de UNO inter la du mondmilitoj, jam proksimiĝis al la punkto fari Esperanton sia oficiala lingvo. Sed Francio tion haltigis. Hodiaŭ la anglosaksaj landoj

kontraŭas. Por la plimulto de la eŭropanoj estus ekz. ekonomie avantaĝo, se Esperanto iĝus aldona oficiala lingvo.

Lingvo certe bezonas kulturon kiel portanton?

Estas dubeble. Kelkaj homoj asertas, ke la angla estas ĝuste eble tial tiom sukcesa, ĉar ĝi sendependiĝis de la anglosaksa kulturo. La anglan oni ligas kun potenco kaj influo. Ĝi estas prestiĝa lingvo.

Plia objeto kontraŭ planlingvoj estas ke ili estas artefaritaj.

Kiu lingvo estas natura? Neniu! Ĉiu lingvo estas prilaborita. Prenu kiel ekzemplon la islandan. En tiu lingvo oni ne transprenas fremdlingvajn vortojn, sed oni kreas novajn vortojn por novaj fenomenoj.

La tuta mondo parolas la anglan...

La mondo ne parolas la anglan. Ses pocentoj de la monda loĝantaro havas la anglan kiel gepatran lingvon, ses pluaj pocentoj parolas la anglan flue. Multegaj homoj scipovas nur kelkajn frazojn kaj vortojn.

Ĉu planlingvoj havas ŝancon?

Principe, jes. Dependas de tio, ĉu la opaj landoj atendas akiri avantaĝon per tio. En plurlingva mondo Esperanto povus esti helpo, komplemento – sed ne anstataŭanto de aliaj lingvoj. Kiel jam dirite, necesus internacia konvencio por apliki tian lingvon.

Intervjuis: *Daniel Sägesser*, Coopzeitung. Traduko el la germana: *Kurt Fischer*
Temas pri artikolo aperinta en Coopzeitung Nr. 27, la 3an de julio 2007.
<http://www.coopzeitung.ch/index.cfm?&id=32638>

Vi trovos ĉiujn bildojn de la originala, germanlingva artikolo en la versio PDF-a je la adreso (mallongigita): <http://14199.com/87e243>

En la sama numero de Coopzeitung aperis longa intervjuo kun Andy Künzli pri lia verko, la Svisa Enciklopedio Planlingva.

3. Iĝu delegito de UEA !




Malkreskis la nombro de svisaj UEA-delegitoj kaj fakdelegitoj – avertis pri la fenomeno Andy Künzli antaŭ la kongresoj. Lian konstaton konfirmas Osmo Buller el la Centra Oficejo, laŭ kies kalkuloj en Svislando devus esti 31 delegitoj, por ke ilia proporcio egalu tiun de Svislando inter la individuaj membroj de UEA. Nun estas nur 18 svisaj delegitoj.

Povas esti, ke tiu malalta nombro venas el la timo pri « inundo » da diversaj petoj, kiujn oni ricevas estante delegito. Tio fakte estas troigo, kies mala versio same ekzistas: oni ne

strebas esti delegito ĉar eble neniam iu petos ion. Sed, esti delegito estas kiel esti libro en biblioteko. Dum jaroj neniu bezonas tiun libron, sed en iu momento ĝuste ĝi povas plenumi gravan bezonon de iu – aldonis Osmo. Kaj nuntempe estas pli facile rilati kun la informpetantoj, ĉar plej ofte la kontakto okazas rete.

Andy mem ricevis en la multaj jaroj de sia delegiteco nur tre malmultajn leterojn aŭ mesaĝojn, kaj kvazaŭ neniam peton pri tranokto, por kio ja ekzistas Pasporta Servo. Same, Didi Weidmann substrekas, ke la laborŝarĝo

kompare kun aliaj taskoj estas minimuma, malpli ol duona horo monate en Zuriko, do en malpli centraj urboj au vilaĝoj certe tiu ŝarĝo estas eĉ multe malpli, li diras.



Legu kelkajn vortojn el la salutmesaĝo de la nova prezidanto de UEA, **Probal Daşgupto** el Barato, kiujn li prononcis dum la 92-a UK en

Jokohamo, Japanio: «Ni estas helpema lingvanaro, ni kredas, ke la lingvoj devas per neŭtrala pontado plibonigi sian komunikreton. Kial? Ĝuste ĉar la plej drastaj suferantoj bezonas esti atingataj kaj servataj fulmrapide. Eĉ sur pli banala nivelo, ni ĉiuj ja scias, ke la delegita reto kaj aliaj UEA-strukturoj estas absolutaj antaŭkondiĉoj por nia kolektiva ekzisto, pli gravaj ol la gramatiko. La nuna estraro laboras por plifirmigi niajn instituciojn, ĝuste ĉar ni vidas en ili la esencon kaj estontecon de la zamenhova lingvo.»

(el *Ondas Jokohamo*, Kongresa Kuriero n-ro 6, 2007-08-10, vendredo)

4. Radiostacioj, videoj, gazetoj esperantaj

Radiostacioj

Jo Haazen en Belgio okupiĝas pri esperantaj radiostacioj. Li atentigas nin pri la Esperanto-radioj, kiujn indus subteni per informado pri ties ekzisto. «Krom ilia kontribuo al la kleriĝo de esperantoparolantoj, iliaj elsendoj estas ja gravaj oficialaj atingajoj, kiuj klare pruvas antaŭ skeptikuloj, kleruloj, politikistoj kaj diplomatoj ke Esperanto estas reala, vivanta lingvo.»

Jen mallonga prezento de kelkaj hazarde elektitaj radiostacioj, sen pretendo pri kompleteco de la listo:

Eszperantó-Rádió Jászberény, Hungario (Esperanto-Radio el la hungara urbo Jasberenj) havas en sia programo intervjuojn, muzikon, kaj diversajn prelegojn. Vi povas aŭskulti ĝin vizitante la retpaĝon: http://web.pr.hu/ferhar/radio_hu.html aŭ malfermante la adreson de la radiostacio: <http://87.242.42.155:8000> per via komputila muzikilo (WMP, Real)



Esperanto Radio Arkivo


<http://www.radioarkivo.org> - estas listo kaj kolektaro de son-dosieroj en MP3 formato. La programeroj estas aŭ Esperanto-lingvaj aŭ pri la lingvo Esperanto.

Tiu ĉi arkivujo ekzistas ĉar kelkaj radiostacioj ne funkciigas siajn proprajn ret-arkivujojn. La Arkivo celas doni al Esperantistoj eblon aŭskulti laŭvole programerojn; ne nur dum ties rekta, viva elsendo.

Ekzemploj: Radio Havano Kubo ne elsendas rete, sed registritaj programeroj estas enretigitaj ĉi tie. - Radio Suda Kanalo ja elsendas rete per flua-MP3, sed ne arkivas dosieron. - Radio Rio de Janerio ja elsendas rete per flua-Microsoft Media Player, sed ne ĉiuj povas aŭskulti tion. - Radio Itala Internacia ja elsendas rete, sed arkivas siajn programerojn nur dum unu semajno. - Radio 3ZZZ ja arkivas, sed nur unu semajnon, kaj en Real Media formato, ne facile elŝutebla...

Radio Aktiva - el Urugvajo,

<http://radioaktiva.esperanto.org.uy> elsendas la tutan tagon, ĉiutage novajn programerojn. La programaro ĉiutaga



daŭras inter du kaj tri horoj kaj ĝi ripetiĝas dum la tago. La radio havas programojn en esperanto, en la hispana kaj dulingvajn, por diversaj aŭskultantaroj: kiuj volas informiĝi pri esperanto aŭ ĝin lerni, lernantoj kaj esperantoparolantoj kiuj

volas aŭskulti kaj ĝui radion en esperanto.

esPodkasto la podkasto en esperanto de rolfo@esperan.to invitas nin al:

« duonserioza programo pri ĉio kaj ĉiu ajn, ekzemple: vortoj malbone konataj, parolturnoj kaj proverboj, diversaj kuriozaĵoj. Viaj kontribuoj estas bonvenaj» <http://esperan.to/podkasto/>



Pola Radio estas unu el la plej gravaj radiostacioj, kiu ĝis januaro 2007 elsendis onde kaj ekde tiam ĝi estas aŭskultebla nur rete. <http://www.polskieradio.pl/eo/>



www.ParoluMondo.com, Brazilo

Parolu Mondo

En **Radio Verda**, « Arono kaj Karlina prezentas mallongajn diversaĵojn el Esperantujo kaj el la tuta mondo... »



www.radioverda.com

Arkivo de 3ZZZ Radio en Esperanto - el Melburno, Aŭstralio, fare de Melburno Esperanto-Asocio.

Arkivo de 3ZZZ Radio en Esperanto



www.melburno.org.au/3ZZZradio

Certe vi ne forgesis pri la esperantaj elsendoj de ***Svisa Radio Internacia***.

Granda kaj kreskanta parto de la arkivoj de tiuj prelegoj estas nun legebla kaj aŭskultebla en la retejo de ***Claude Gacond***, kiu kun sia edzino ***Andrée*** prelegis de 1962 ĝis 1992 ĉe la kurtondaj elsendoj de SRI. Iliaj tekstoj kaj voĉo estas rete konservitaj. Inter la prelegistoj troviĝis ankaŭ aliaj svisaj esperantistoj kiel ***Arthur kaj Heidi Baur, Andy Künzli***. Kvankam temas

pri malnovaj elsendoj, ties kleriga kaj lingva valoro restis valida.

www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj.html




Vi povas trovi pliajn radiostaciojn en la reto kaj per via tradicia radio-aparato.

Televido, retaj videoj

Post malapero de Internacia Televido (ITV), ne plu estas en Esperanto konstanta elsendfluo televida en la reto. Pli kaj pli aperas esperantaj videoj en diversaj retejoj neesperantistaj kiel www.youtube.com, www.dailymotion.com kaj www.myspace.com, kies kopioj aŭ similaj retvideo-servoj aperadas senĉese kaj laŭvice kopiante la alireteje jam aperigitajn filmojn. Por trovi esperantajn videojn simple serĉu en la koncerna retejo per la ŝlosilvorto «esperanto».

En esperantujo ekzistas simila servo pri retvideoj:

Farbskatol'



Farbskatol'

«ni farbu vian ekranon per neimageblaj bildoj»



Atingebla je la retejo <http://farbskatol.net> - ĝiaj paĝoj prezentas filmojn en Esperanto laŭ plej diversaj kategorioj: humuro, fikcio, porinfana, muziko, teatro, kuirarto, sporto, eventoj, movado, intervjuoj, ktp. Oni povas sendi al la retejestroj sian filmon, kiu estos aperigita laŭ prijuĝo de la kreintoj de Farbskatol'. Ĉiu filmo estas konvertita al "flaŝ" versio, spektebla per Macromedia Flash Player, kion normale ĉiu komputilo aŭ jam enhavas aŭ facile elŝutas.

Vizitantoj povas komenti la filmojn, kontaktiĝi inter si. Ŝajnas, ke *Farbskatol'* iĝis la anstataŭanto de ITV por longa tempo, ebliganta filmspektadon laŭ deziro momenta.

Gazetoj

Esperanta Gazetejo



<http://gazetejo.org>

La relative nova retejo: <http://gazetejo.org> «kunigas informojn pri esperantaj gazetoj. Ĝi ebligas uzantojn ĝui plej diversajn esperantajn gazetojn kaj estas ankaŭ ilo por gazet-redaktistoj kaj verkistoj reklami pri siaj gazetoj kaj profitigi sian gravan kaj laŭdendan laboron al la tuta esperantistaro».

Vizitantoj trovas gazetojn laŭ pluraj kategorioj, serĉante per ŝlosil-vortoj. Krome la diversaj periodaĵnumeroj estas «trafoliumeblaj» kaj elŝuteblaj en pdf-a formato ĉu senpage kaj komplete, ĉu malkomplete kaj senpage, aŭ eĉ legeblaj en retpaĝa versio.

Paperaj versioj, arkivoj

Kiel ĉe la radioelsendoj, ankaŭ ĉe la gazetaro ekzistas arkivejoj de malnovaj numeroj de la paperaj versioj de diversaj periodaĵoj. Tiuj arkivejoj troviĝas ofte en bibliotekoj ĉu privataj, ĉu urbaj, ŝtataj. La svisa esperanta movado povas fieri pri la ekzisto de **CDELI**, kiu ĝuas privilegion lokon kaj statuson en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Se vi deziras trafoliumi antaŭajn numerojn de esperantaj gazetoj, magazinoj kaj diversaj publikaĵoj surpaperaj, sed ankaŭ se vi legus ĵus aperintan numeron, ne hezitu viziti la arkivejon CDELI. Oni trovas informojn pri la diversaj servoj pli kaj pli kompletigitaj ankaŭ en la retejo de la arkivisto, Claude Gacond: www.esperanto-gacond.ch



Tiu ĉi konciza prezento

pri diversaj klerigiloj kiel radioelsendoj, televidaj programoj (filmoj) kaj gazetaro, ne havis la celon strebi je kompleteco – kaj tio eĉ ne eblus kadre de tiu ĉi limigita spaco je dispono. La ideo estis: vekti emon (se ĝi ĝuste «dormus» ĉe iuj el la legantoj) pri plena utiligo, uzo de tiuj servoj je dispono de la esperantistaro: aŭskultado de radioelsendoj, spektado de esperantaj filmoj, legado de gazetoj, libroj. Ĝuu nian kulturon!

5. Retejo de SES

Kiel mi jam skribis en la antaŭa numero de SESi pri la temo *retejo* «...mi persone klopodos dediĉi tempon kaj laboron al la aktualigo de la retpaĝoj de SES », vi certe atendis la aperon de ŝanĝoj en la retpaĝaro de Svisa Esperanto-Societo.

Kiam vi legos tiun ĉi numeron de *SES informas*, vi jam povos konstati kelkajn aktualigojn en tiuj paĝoj, kiujn vi atingas pere de <http://esperan.to/ses/>. Plia progreso montriĝos iom post iom. La reta versio (pdf) de la lastaj kajeroj de «Vivo de SES» kaj de «Kulturaj paĝoj», eroj de *SES informas*, jam ekaperis ekde la antaŭa numero, kaj oni povas ilin libere elŝuti de la paĝo: <http://www.esperanto-gacond.ch/SES-informas.html>

6. Donacoj ricevitaj dum junio 2007

Sume: 295.- svisaj frankoj.

Donacintoj:

Anonima, por la enciklopedio (100); S-ro Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen (35); S-ino Raphaela Cueni, Laufen (50); S-ino Agnès Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20); S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds (15); S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20); S-ro Peter Menzi, Oberengstringen (15); Parzival, Biel (20); S-ino Mady Reymond, Neuchâtel (20).

Nome de SES, Hans-Werner Grossmann, la kasisto dankas la donacintojn pro ties malavara subteno al nia societo.

Novaj patronoj, 2007

S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds, S-ino Marguerite Jaccard-Besson, Rolle, S-ro Peter Menzi, Oberengstringen.

Ne forgesu:

a) La estraro atendas viajn proponojn pri agadprojektoj en 2007 kaj 2008: ideojn kaj la personojn, kiuj respondecos pri la aktiveco, organizos, realigos ĝin.

b) Anoncu vin ĉe ses@esperanto.ch, se vi deziras bonvolule kunlabori en la diversaj agadoj de la societo aŭ de la lokaj grupoj, laŭ nia alvoko fine de la artikolo pri gazetaraj komunikoj.

Nome de la estraro de Svisa Esperanto-Societo kore salutas vin:

Stefano Keller, sekretario

Tutsvisa aktiveco

Invito al grava konferenco-tago

okazonta en La Chaux-de-Fonds

ĉe CDELI en la urba biblioteko

la sabaton 1-an de septembro

sub la aŭspicio de ILEI, SES kaj UEA

Prelegos Reinhard Haupenthal

eldonisto, historiisto, esperantologo kaj esploranto pri
Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük.

Programo kaj horaro :

10.00 : **Malfermo de la CDELI-salono**, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.45 : **Oficiala malfermo** de la konferenco-tago en la salono Charles Humbert.

11.00 : Unua prelega periodo dediĉita al la biografio de Johann Martin Schleyer : stacioj de lia vivo, liaj roloj kaj funkcioj.

11.45 : paŭzo kafuma.

12.00 : Dua prelega periodo dediĉita al la starto de Volapük en komparo kun la starto de Esperanto : elmonro de paraleloj.

12.45 : Kuniro al najbara picejo por **komuna tagmanĝo** (pago surloka).

14.15 : Tria prelega periodo dediĉita al la historio de Volapük : ĝiaj disvastiĝo, literaturo kaj gazetaro. Ĉefaj figuroj de la Volapük-movado.

15.00 : paŭzo.

15.15 : Kvara prelega periodo dediĉita al la lingva strukturo de Volapük.

16.00 : **Konkludo** en la CDELI-salono : eblo aĉeti librojn, babili kaj teumi.


17.00 : **Oficiala fermo.**

Aliĝo : Por faciligi la organizon de la konferenco-tago ĉiu partoprenonto sin anoncu ĉu skribe al Claude Gacond, CDELI, Bibliothèque de la Ville, CP 3034, CH-2303 La Chaux-de-Fonds, ĉu rete : claude.gacond@ne.ch, ĉu telefone : CDELI : 032 967 68 42.

Partopren-kotizo pagota surloke : po frankoj 20.- por partopreno anoncita ĝis la 25-a de aŭgusto, po frankoj 25.- por partopreno anoncita post la 25-a de aŭgusto, po frankoj 30.- por partopreno ne antaŭ-anoncita. Duonpreze por studento. **Do tuj anoncu vian aliĝon al tiu neordinara renkonto!**

-oOo-

Ni konatiĝu kun Reinhard Haupenthal



Fotis Claude Gacond.

Reinhard Haupenthal hejme en sia interlingvistika dokumentejo.

Reinhard Haupenthal tre sindone pretigas la prelegojn, kiujn vi havos la okazon aŭdi kaj pridiskuti la 1-an de septembro. Liaj komparoj inter Schleyer kaj Zamenhof kaj inter la ekdisvolviĝo de iliaj lingvoj estos tre instruaj ne nur pri Volapük, sed ankaŭ pri Esperanto. Tial mi vigle instigas la kulturemajn esperantistojn profiti tiun unikan okazon renkontiĝi kun unu el la gravaj esperantologoj.

Reinhard Haupenthal naskiĝis la 17-an de februaro 1945 en Kronach / Oberfranken en Germanio, studis en Sulzbach / Saar, eklernis esperanton en 1961 kaj ekde tiam starigas tre signifan planlingvan dokumentejon. Siajn studojn (1964-1969) ĉe la Sarlanda Universitato en Saarbrücken li dediĉis al ĝermanistiko, teologio, filozofio, pedagogio kaj historio, deĵorante samtempe kiel

instru-komisiito por esperantologio kaj interlingvistiko. Lia eldona aktiveco, kiun li nelacigeble daŭrigas kun sia edzino Irmi kadre de Editions Iltis, jam komenciĝis en 1968. Ekde sia geedziĝo en 1969 Reinhard kaj Irmi Haupenthal unue loĝis en Dudweiler kaj poste ekde 1978 en Scheidt en Sarlando. Ili vigle kunlaboris kun CDELI (1971-1978) al la savo kaj ordigado de interlingvistika dokumentaro.

Sekve al deĵor-akcidento en 1993 Reinhard Haupenthal pensiiĝis en 1996 el sia instruaktiveco universitata kaj licea kaj li translokiĝis al Provenco en Malaucène, kie li vivas kun sia edzino Irmi kiel kamparano, aŭtoro de fakaj libroj, eldonisto kaj tradukisto.

Claude Gacond

Literatura tago en Berno

Sub la aŭspicio de SES okazos literatura tago en Berno, se sufiĉaj interesatoj venos al la federala urbo. Dum la jarkunveno en Ĝenevo Mireille Grosjean invitis al iniciatoj kaj mi respondas per tiu invito.

Dato : Sabate 13-an de oktobro 2007.

Ejo : Hotelo Bären, Schauplatzgasse 4, inter Loeb kaj la Parlamentejo, nur 4 minutoj de la stacidomo, placo rekonstruata kun baldakeno.

Programo

11h00 : Intervjuo kun **Willy Nüesch**, pastoro de la Komunumo de Kristanoj en Berno. Li tradukas kaj eldonas antropozofiajn verkojn de Rudolf Steiner kaj verkaĵojn de germanaj klasikuloj kiel Goethe, Schiller, C.F. Meyer kaj ceteraj. Kiu estas tiu kvieta studemulo kaj kiel li procedas ?

12h15 : Tagmangho en la restoracio, elektota laŭ la menukarto (15-20 fr). Admiru tie la amuzajn pentraĵojn pri la berna urso.

14h00 : D-ro **Giorgio Silfer**, libera docento pri interlingvistiko kaj esperantologio en la universitato de Torino, prezentas la poeton **William Auld** kaj lian verkaron. Auld forpasis antaŭ unu jaro kaj ni memoru digne pri tiu elstara verkisto, la unua esperantlingva kandidato por la literatura Nobel-premio. Ni spektos filmon, auskultos prelegon kaj deklamadon. Preparu kelkajn demandojn por la diskuto. Iru hejmen kun la deziro legi libron de William Auld. Diversaj verkoj de Auld surloke aĉeteblos.

16h00 : Fino.

Organizo : Bruno Graf, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. Telefono 031 921 44 59, retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch. Mi petas anonci vin ĝis la 6-a de oktobro.

La kotizo de 20 fr. estas pagenda surloke. Duonpreze por studentoj. (Bonvolu pretigi la monbileton.) Mi dankas pro via intereso kaj esperas renkonti literatremulojn el la tuta lando. Helpu sukcesigi la eksperimenton per via ĉeesto kaj travivu esperantan kulturon.

-oOo-

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33

CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoj :

claude.gacond@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

Nova kunlaboranto

Kovrilpaĝe de la bulteno vi povis bilde konatiĝi kun Sonia Bétrix-Koleva, nova kunlaboranto de CDELI. Ŝi ĝenerale venas matene la merkredon, ofte kun sia fileto Nicolas, por zorgi pri la gazet-artikoloj, kiuj rilatas al esperanto aŭ interlingvaj problemoj, kiujn afable sendas al ni esperantistoj aŭ amikoj de esperanto. Ilin ni profitas danki, ĉar nur per tia kunlaboro la artikola kolekto de CDELI povas reale riĉiĝi.

Ni profitas la okazon por atentigi la artikol-sendantojn ne forgesi ĉiam indiki la nomon de la gazeto, en kiu aperis la koncerna artikolo kaj la daton mem de la apero de la artikolo. Sen tiuj absolute necesaj indikoj la artikoloj perdas sian valoron.

Sonia Bétrix-Koleva trovis multajn artikolojn amasiĝintajn dum pluraj jaroj, ekde kiam Gabrielle Gacond pro blindiĝo devis ĉesigi sian helpadon. Tiel la grava artikola kolekto de CDELI reaktualiĝos. Ŝi plenumas sian utilan laboron ne nur

en CDELI mem, kie troviĝas la ordigiloj, sed ankaŭ hejme.

Aliaj regulaj helpemuloj al CDELI estas bonvenaj por precize difinitaj taskoj, kiuj certe abundas. Do se vi sentas vin kunlaborema, ne hezitu proponi vian deĵoremon.

Donacoj

Menciinda estas la donaco de Ernst Glättli, kiu alportis parton de sia libraro. En venonta raporto ni statistike mencios el ili, kiom da riĉigis la kolekton de CDELI kiel novaj libroj aŭ broŝuroj. Pri ĉiu titolo CDELI arkivas 3 ekzemplerojn, po 2 restas konsulteblaj nur surloke, la tria riĉigas la kolekton de la elprunteblaj verkoj. Do la donaco de Ernst Glättli ankaŭ riĉigis la kolekton de la duoblaĵoj kaj de la elprunteblaj trioblaĵoj. Kiam titoloj jam ekzistas en tiuj tri kategorioj, tiam ili riĉigas la brokantan servon de CDELI, kiu ebligas interŝanĝojn kun aliaj dokumentejoj kaj vendojn al aĉetemuloj.

Do ne hezitu imiti Ernst Glättli donacante al CDELI la esperantajn

librojn, dokumentojn kaj revuojn, kiuj troas en via propra kolekto.

Esperantistoj ofte esprimas al ni timon, ke sekve al subita translokiĝo al maljunulejo aŭ pro morto, iliajn esperantaĵojn forĵetu la heredantoj. Ili sciu, ke ekzistas ebleco pri redakto de atentigo al la heredantoj por la transdono de esperantaĵoj al CDELI.

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Rezervu la sekvajn sabatojn : **septembre 22, oktobre 20, novembre 17, 2008 januare 19, februare 16, marte 15.**

Kultura seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **septembre 1** dediĉita al komparoj inter volapük kaj esperanto kaj Schleyer kaj Zamenhof dank'al la kompetento de Reinhard Hauptenthal, **oktobre 6, novembre 3, decembre 1, 2008 februare 2.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos re-

kompencitaj per ricevo de atestilo. Pasint-sezone ni dediĉis nian atenton al la naskiĝa periodo de esperanto. Por iom varii, dum la venontaj renkontoj ni orientos nian atenton al la decidiga lingva influo de la skolo naskiĝinta ĉirkaŭ la budapeŝta revuo *Literatura Mondo*.

Horaro de ambaŭ aranĝoj


10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.45 : Oficiala malfermo, formiĝo de la stud-rondoj. 11.00 : Studo. 11.45 : paŭzo. 12.00 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo. 14.15 : Studo. 15.00 : paŭzo. 15.15 : Studo. **16.00 : Konkludo** kaj teumo, librovendo. **17.00 : Oficiala fermo.**

Aliĝo : Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj **ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo antaŭ la koncerna aranĝo** al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete : nancyfontannaz@freesurf.ch.

Partopren-kotizo : Por minimuma kovro de la elspezoj la partopren-kotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj).

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Venontaj kunvenoj

Septembre 17 : Ĉe Béroud-Focke je la 19.00. Aliĝo ĝis la 23-a de septembro.

Oktobre 25 : Kunveno : Rakonti pri la ferioj.

Novembre 22 : Kunveno. Programo 2008.

Decembre 15 : Zamenhofa festo en Francio.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20.

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) 20.00 en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, salono 2.

Bedaŭrinde ne venis informoj pri la grupa aktiveco.

-oOo-

Kantono de

Neuchâtel

La Chaux-de-Fonds

Vesperaj kunvenoj ĉe CDELI

En via agendo nepre notu la datojn de la venontaj grupaj kunvenoj vesperaj : **oktobre 26, novembre 10, decembre 7, 2008 januare 9, februare 13 kaj marte 12.** Tiuj kunvenoj estas dediĉitaj al ĉiuj esperantistoj de la kantono de Neuchâtel dezirantaj plilertiĝi en la praktiko de esperanto per paroligaj ludoj, prelegetoj, legaj momentoj, diskutoj kaj festaj momentoj.

Ĉar vespere la enira pordo de la biblioteko estas ŝlosita, premu la sonorilan butonon de CDELI, kiu troviĝas dekstre de la enirpordo de la biblioteko kaj iu venos malfermi la pordon por liftigi vin al la CDELI-salono. Horaro : Alveno eblas ekde la 19h45. Grupa kunveno de la 20h00 ĝis la 21h45. Fermo de la salono je la 22h00.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

esperanto@isuisse.com

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20.00.

Venontaj kunvenoj

Septembro 03 : Preparado pri filmeto gvidata de François Randin.

Oktobre 01 : Kunveno: Claude Gacond raportos pri 30 jaroj de por-esperanta kronikado ĉe Svisa Radio Internacia (1962-1992). Liaj tiamaj radioprelegoj nun reaŭdeblas kaj relegeblas dank'al la reteja miraklo kaj al la efika kunlaboro de Nancy Fontannaz kaj Stefano Keller. Claude Gacond aŭdigos kaj legigos al ni karakterizajn radioprelegojn kaj ni diskutos pri ilia nuna uzo.

Novembre 05 : Diskutoj pri plursencaj vortoj, kun Daniel Schöni Bartoli.

Decembre 15 : Zamenhofa festo.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Septembre 12 : ĉe Bellini : 14.00-16.00 : Konversacia rondo, kun Paul Scherer.

Oktobre 10 : ĉe Rey : 14.00 : Paroliga leciono, kun Paul Scherer. 14.30 : Pensiulino parolas pri aktiva 3-a aĝo, kun Margrit Scherer.

Novembre 14 : ĉe Bellini : 14.00-16.00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

Decembre 12 : ĉe Rey : 14.00 : Paroliga leciono. 14.30 : Zamenhofologio kaj programo 2008, kun Paul Scherer.

2008 Januare 09 : ĉe Bellini : 14h00-16h00 : Konversacia rondo, kun Sonja Brun.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19.00 en la Restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18 (pedire je kvin minutoj oriente de la stacidomo).

Venontaj kunvenoj

Septembre 5 : Lingvo-ekzercado kaj programo decidota.

Oktobre : sen aranĝo.

Novembre 7 : Vojaĝraporto el Hispanio.

Decembre 5 : Fondua vespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

Reĝustigo

El la raporto *Eblas alia lingva mondo*, kiun ni publikigis en *SES informas* 2007-2, estis erareto, kiu ridigis la Wil-anojn. Ne estis vico, kiu venis sin nutri ĉe la esperanta

stando, sed vico, kiu atendis ĉe la apuda stando ! Ĝi tiel longiĝis ĝis la esperanta stando ! Jen do reĝustigo por la historiistoj :

“Neordinara momento estis, kiam la homoj vicis ĝis nia stando atendante manĝaĵon : Ni tiam kaptis tiun ŝancon kaj ofertis al ili kiel antaŭ-manĝaĵon niajn keksojn en formo de verda stelo; kaj multaj atendantoj komencis babili kun ni informiĝante pri tiu nekonata afero nomata Esperanto.”

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-


Seefeld. Tel : 044 251 50 25

info@esperanto.ch.

Reto : www.esperanto.ch/zuriko

Bedaŭrinde ne venis informoj pri la grupa aktiveco.

-oOo-



Reinhard Haupenthal

Mortoj

Jean-Emile Waldvogel

1914 – 2007

Mortis 94-jaraĝa Jean Waldvogel, kiu loĝadis ekde pluraj jaroj en oldulejo en Bevaix. Kiam pro kripliĝo li estis devigita forlasi sian hejmon en Gorgier, tiam li donacis al CDELI siajn esperanto-libraron kaj gazeton.

Estas la pastoro Edouard Waldvogel (1893-1994), lia onklo, kiu instruis al li esperanton, kiun li ĉefe praktikis kadre de laborrestadoj de Civil-Servo Internacia en la tempo de Pierre Ceresole. Poste li ŝatis plue praktiki la zamenhofan lingvon kadre de la semajnfinaj renkontoj de Esperanto-Edukistaro de Svislando, ĉefe kiam ili ebligis praktiki skiadon vintre aŭ migradon en la naturo alisezone. Kaj tiam li ne hezitis alporti deĵoran helpon al la organizantoj de tiuj aranĝoj.

Claude Gacond

-oOo-

Enrico Balmelli

1917-2007

Mortis Enrico Balmelli, iama lokomotivestro, apartenanta al la generacio de la SAEF-aktivuloj Sasselli, Albertini, De Faveri. Li estis

speciale aktiva en Bellinzona. Li partoprenis al la fondo de Tiĉina Esperanto-Ligo en 1963, kies prezidanto li restis dum multaj jaroj.

Li estis idealista esperantisto, kiu dum longa tempo kredis, ke esperanto estas esenca elemento por la progreso de la homaro.

Kun Fernando De Faveri li aperigis en multobligita formo korespondan kurson de esperanto. Pli malfrue li aperigis en presita formo ankaŭ itallingvajn romanetojn. La unua aperis en 1984 : *Dall'alto della locomotiva*. En tiu verketo, en formo tre vigla kaj interesa, Balmelli priskribis sian laboron kaj travivaĵojn kiel lokomotivestro, ĉefe dum la dua mondo-milito, en la fervoja linio inter Bellinzona kaj Luino (Italio). La dua romaneto, *La speranza del 2000*, aperis en 1986. Temas pri krimromaneto, kun spiona fono.

Mi memoras lian pretecon kunlabori, lian afablecon, kaj lian laboremon en la multaj taskoj organizaj kaj propagandaj, kiujn siatempe kaj SAEF kaj Tiĉina Esperanto-Ligo alfrontis.

Tazio Carlevaro

-oOo-

Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9302 Kronbühl, rischneller@gmail.com
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ĉu la tuta mondo suferas pro afazio ?

Dua parto

Prelego (forme reverkita) prezentita dum la Printempa Semajno Internacia en Bonn la 3-an de aprilo 2007 kaj dum la SES-Tago en Ĝenevo la 28-an de la sama monato de la sama jaro.

• *Claude Piron*

La tria tipo: afazio soci-devena

Mia hipotezo estas, ke ekzistas tria tipo de afazio, kiun neniu, miascie, iam ajn pritraktis kiel apartenantan al la kampo de afazio. Mi nomas ĝin «soci-devena afazio». Ĉar la kaŭzo kuŝas en la aranĝo de la socio.

Mia rezono estas jena. **La homa cerbo estas programita por ke homoj povu lingve esprimi sin kaj tiel komuniki, kompreni unu la alian.** Ke oni interkompreniĝu, tio estas rigardata normala. Kiam infano, kiel la dekdu-jarulino, pri kiu mi antaŭe parolis, kreskas, kreskas, kreskas kaj post kelkaj jaroj tamen ankoraŭ ne komencis paroli, en la aĝo, en kiu la plimulto kapablas esprimi sin, ĉiuj diras: «Estas io nenormala.»

Nun ni rigardu kio okazas, kiam, ekzemple, japano provas komuniki kun ĉeĥo. En nia tempo, ili ĝenerale provas interparoli angle. Sed fakte ili komunikas kiel afaziuloj.

Bonan priskribon pri tia speco de fuŝa komunikado siatempe prezentis

usona ĵurnalisto Barry Newman en artikolo titolita «World Speaks English, Often None Too Well; Results Are Tragicomic», («La mondo parolas angle, ofte ne tro bone; rezultoj estas tragikaj/komikaj») en *The Wall Street Journal*, vol. LXXVI, n° 110, 22-a de marto 1995. Li prezentas konversacion inter la direktoro de Daihatsu-Auto en la Praga filio de la firmao kaj ties ĉefaj kunlaborantoj. Konstante montriĝas, ke ili nur malfacile komprenas sin reciproke. Sed ĉiu el ni certe ĉeestis tiajn interŝanĝojn inter malsamlingvanoj, kiuj provas komuniki angle, kaj tion tre malfacile aŭ tute ne sukcesas fari. Mi rakontis en *Le défi des langues* pri konversacio, kiun mi aŭdis en liberaera kafejo, inter juna nederlandano kaj samaĝa francino, kiuj ambaŭ biciklis en la regiono. Ili provis komuniki angle, sed ilia angla tute similis la lingvaĵon de ne tro severe trafita afaziulo. En tiaj situacioj, oni rimarkas jenon.

– Konstante, la bezonata vorto mankas, ĝi ne venas en la menson, kaj la parolantoj devas fari gestojn aŭ komplikajn ĉirkaŭesprimojn por provi klarigi, kion ili celas.

– Ili ofte havas survizaĝe esprimon, kiu signifas, ke ili ŝatus ion diri, sed tuj montriĝas, ke ili rezignas. Kiel eble plej ofte ili respondas per jes aŭ ne. Oni vidas sur la vizaĝo esprimon de frus-

triĝo tre ofte, kiam ili komencas paroli, kaj tuj konstatas, ke la vortoj mankas al ili. Kelkfoje, ili trovas la vortojn, sed ne kapablas formi el tiuj frazon kompreneblan.

– Ili prononcas neklare, ne kapablas eligi la ĝustajn sonojn. Ili parolas malrapide. Ofte la alparolato ne komprenas, ĉar la artikulacio ne estas ĝusta por diversaj sonoj, kiel la angla /th/ aŭ grupo da konsonantoj fine de vorto, kiel en *first, asks, acts, posts* ktp. En tiaj kazoj japano, ekzemple, ofte aldonas vokalojn. Unublove prononci tri sinsekvajn konsonantojn fine de vorto estas tre malfacile por la plimulto el la popoloj.

– Ili kelkfoje fuŝe uzas konsonanton aŭ vokalon. Ekzemple japano, ĉino aŭ vjetnamo diras *stin* anstataŭ *still*, *berry* anstataŭ *very*, kaj li prononcas *accent* anstataŭ *accept*, kaj *caught* anstataŭ *coat*.

– Relative ofte ili miskomprenas, kion oni ĵus diris.

Kiel ni vidis antaŭe, tiuj estas la tipaj simptomoj de afazio. Oni do rajtas paroli pri afazio tiukaze. Sed klare, la kaŭzo de la afazio estas nek io fizika en la cerbo, nek io psikologia, kvankam verŝajne parte temas pri psikologia afero. Tiuj homoj montriĝas ne certaj pri si, pri la regado de la lingvo, kaj tiu manko de memcerteco estas psikologia faktoro, kiu komplikas la problemon. Tamen la ĉefa kaŭzo de la afazio ne kuŝas en korpa, t.e. cerba, aŭ en psika problemo. Ĝi kuŝas en la maniero, laŭ kiu nia socio, je tutmonda skalo, pri-traktas la lingvoproblemojn.

Ekzistas malsamlingvanoj, kiuj ne kondutas afaziule

Kaj tion pruvas komparo kun aliaj personoj, tute similaj socie, etne, sane,

intelekte, kiuj ne prezentas la afazian simptomaron. Observu, kiel komunikas samaĝaj kaj socie samnivelaj malsamlandanoj, kiuj renkontiĝas dum Esperanto-kongreso, se ili estas tio, kion Prof. Pierre Janton nomis «maturaj esperantistoj», do homoj kun sperto en la Esperanto-mondo, kiuj plurfoje vizitis Esperanto-aranĝojn.

Komprenoble, kelkfoje ili ne trovas la ĝustan vorton, sed multe malpli ofte ol tiuj, kiuj samlonge studis alian komuniklingvon. Ili multe malpli devas fari gestojn aŭ plurvortajn klarigojn por esprimi, kion ili volas diri. Ili parolas multe pli ol tiuj, kiuj uzas la anglan, kaj vortigas pli kompletajn respondojn. Malpli ofte oni vidas sur iliaj vizaĝoj esprimon de rezignacio aŭ de frustriĝo pro neeblo esprimi sin. Estas ĉe japanoj kaj ĉinoj iom da problemo por prononci /r/ kaj /l/, sed tio malofte kreas konfuzojn, kaj ĝenerale ili sufiĉe klare prononcas. Ili neniam devas stumbli ĉe vortoj finiĝantaj per senpera sinsekvo de konsonantoj, ĉar en Esperanto preskaŭ ĉiuj vortoj en frazo finiĝas per vokalo, duonvokalo, /n/ aŭ /s/, kiuj estas sonoj troveblaj fine de vortoj en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo, inkluzive la japanan. Estas vere, ke japano de tempo al tempo fuŝas konsonanton, ekzemple li povas prononci /bendo/ anstataŭ /vento/, sed kompare kun samlandano, kiu penas esprimi sin angle, tiuj kazoj estas ege malpli oftaj. Krome, ili neniam eraras pri vokaloj. Ili praktike ĉiam komprenas, kion la aliaj diras al ili.

Alivorte, kvankam estas kelkaj spuroj de afazio en la Esperanto-situacio, tute ne temas pri tiel forta afazio, kiel en la situacio, kiam la du homoj provas komuniki angle. Tiu komparo ebligas al ni tute science aserti, ke la afazio de

tiuj, kiuj provas esprimi sin en la angla, ne estas io neevitebla, io, se tiel diri, enskribita en la genoj de homoj aŭ en la maniero, laŭ kiu ilia menso disvolviĝis, **ĝi estas ligita nur al la elekto de la komuniklingvo.**

Kaj pro kio, la fuŝangle parolantoj elektis netaŭgan komuniklingvon? Ofte, ili ne vere elektis. La socio organizis la lingvokomunikadon, mondskale, en tia maniero, ke la alia sistemo estas nekonata kaj neproponita. Homoj do faras, kion oni trudis al ili en la lernejo. Efektive, en Japanio, kiel en Koreio kaj en Ĉinio, multaj homoj komencas lerni la anglan jam en la elementa lernejo, ĝenerale en la kvara aŭ kvina jaro, kaj plu lernas ĝin dum la tuta duagrada studado, kaj post kiam ili havis dek jarojn da studado de angla lingvo kun tri aŭ kvar horoj ĉiu-semajne, do post pli malpli 1500 horoj da penado, ili kapablas uzi ĝin nur afaziule, kiel homoj, kiuj perdis la kapablon paroli (aŭ legi kaj skribi).

La fakto, ke homoj, kiuj investis minimume 50 kaj ĝenerale malpli ol 200 horojn en la bazan studadon de Esperanto, kaj poste havis okazajn praktikojn, poste komunikas kiel cerbe kaj psike sanaj homoj, kaj ne kiel afaziuloj, pruvas, ke la afazio ŝuldiĝas al la elektita lingvo, kaj ne al iu alia kaŭzo.

Ni povas do diri, ke la tutmonda socio organizis sin tiamaniere, ke homoj ne kapablu normale komuniki de popolo al popolo, de kulturo al kulturo. Kaj tio starigas tre gravan demandon. Kial ĝi tion faras?

La respondo estas kompleksa. Ĝi inkluzivas politikajn, sociajn kaj psikologiajn faktorojn.

Politikaj faktoroj en la patologia organizo de la socio en la kampo lingva

Inter la politikaj faktoroj oni povas citi la agadon de la franca registaro, kiam la demando pri Esperanto estis submetita al la Ligo de Nacioj en la jaroj 1920-aj. La malsano «socidevena afazio» tiam estis forte atakita per la propono, ke oni enkonduku la instruadon de Esperanto en ĉiujn lernejojn de la mondo. Sed la franca registaro tre energie agis, por ke tiu propono neniam estu aplikata. Sukcese. La tuta mondo forgesis pri tiu propono.

Same la usona kaj brita registaroj tute klare agas por kredigi, ke ne estas alia solvo al la lingvoproblemo – alivorte, ke ne estas io plia farinda por resanigi la mondon el socidevena afazio – ol instrui kaj uzi la anglan kiel eble plej vaste. Detalojn pri tiu politiko, ofte kaŝa kaj subtila, vi povas legi en libroj kiel tiuj de Robert Phillipson *Linguistic Imperialism* («Lingva Imperiismo») aŭ *English Only Europe* («Eŭropo kun nur la angla»), aŭ, en la franca, en la libro de Yves Eudes *La conquête des esprits* («La konkero de la mensoj»). Tiom pri la politika aspekto.

Sociaj faktoroj

Inter la sociaj faktoroj, oni povas citi la fakton, ke kiam grupo da homoj havas privilegion, ĝi agas por konservi sian privilegian situacion. Nu, nuntempe, oni povus diri, ke sur la kampo de komunikado, la homaro estas dividita en du grupojn: estas tiuj, kiuj regas la anglan, kaj tiuj, kiuj ne regas ĝin. Fakte la situacio estas pli kompleksa ol tio, ĉar la grupo de regantoj de la angla fakte dividiĝas en tutan serion da subgrupoj laŭ la amplekso de

la kapablo uzi ĝin. Estas tiuj, kiuj preskaŭ perfekte scipovas la lingvon. Tiuj estas homoj, kiuj studis dum kvin aŭ kvar jaroj en anglalingva universitato, aŭ longe loĝis en anglalingva lando, aŭ tiuj, kiuj ĉiutage uzas ĝin en sia profesia okupo. Estas tiuj, kiuj sufiĉe bone regas la anglan por povi partopreni en la internacia vivo, tamen ne tute kontentige, ne tute egalece kun denaskaj anglalingvanoj. Estas tiuj, kiuj scias la anglan por kompreni, kio okazas en sia fako, sed ne kapablas aktive flue uzi ĝin en aliaj kampoj, ktp ktp. Sed fakto estas, ke la granda plimulto el niaj samplanedanoj tute ne regas la anglan kaj estas tenata ekster la rondoj de politika kaj ekonomia potenco.

Kaj kompreneble la privilegiuloj aplikas ĉiujn eblajn rimedojn por konservi sian privilegion. Ili do estas tiuj, kiuj faras ĉion por ke oni ne parolu klare pri la lingvoproblemo, t.e. pri tiu formo de afazio, kies radikoj troviĝas en la socia organizo de la mondo. Sekve ili estas instinkte malamikoj de Esperanto. Ĉe denaskaj anglalingvanoj, tiu sinteno estas memkomprenebla. Ili ĝuas grandan avantaĝon, kiun ili deziras ne perdi. Ĉe aliaj, la ideo, eble nekonscia, sed reala kaj influanta la konduton, estas, ke ili investis multe da peno en la akiro de la angla lingvo, kaj ke tiu tuta penado montriĝus perdita, vana, se la angla fariĝus neutila, pro ĝenerala alpreno de Esperanto. Tiuj homoj do agas, ofte nekonscie, por distastigi la ideon, ke nenio krom la angla ekzistas por komuniki de popolo al popolo. Ili fakte sukcesis konvinki preskaŭ la tutan socion, ke tiel estas. Ideoj transdoniĝas kiel viruso aŭ mikrobo en epidemio. La plimulto el la homoj pretas akcepti senkritike ideojn, kiuj estas ripetataj ree kaj ree. Kiam la

homoj, kiuj laboras en amaskomunikiloj, akceptis ideon, ĝi rapide transdoniĝas al la tuta socio, eĉ se estas ideo, kiu fakte komplikas la vivon al multaj milionoj da homoj. Tia estas la nuna situacio pri la ideo, ke ekster la angla ne estas savo, kaj ke ne indas esplori pri tiaj «utopiaj» proponoj kiel Esperanto. Se vi havis okazon diskuti pri tiaj temoj kun ĵurnalistoj, kaj ankaŭ kun aferistoj kaj scienculoj, vi scias, ke ili plejparte havas eĉ ne ereton da dubo pri tio, ke la angla definitive venkis, kaj ke, finfine, tio ne estas malbono. Ke la granda plimulto de la homoj pro tiu sistemo suferas pro afazio, kiam ili eliras el la propra medio aŭ renkontas homojn el alia kulturo, kaj ke tio ne estas io fatala, tion ili eĉ ne kapablas imagi.

Psikologiaj faktoroj

Sed kompreneble ideoj transdoniĝas nur se estas grundo favora al ilia akcepto. Kaj tiel ni atingas la trian specon de faktoroj, kiuj malhelpas objektivite kaj sane pensi pri socidevena afazio, t.e. la psikologiaj faktoroj.

Mi rakontis al vi pri tiu knabino, kiu dum dek du jaroj rifuzis paroli, oni ne scias, kial. En aliaj kazoj oni scias. Kelkfoje infano, kiu dum longa tempo ne eldiris unu vorton, kvankam ĝi normale parolis antaŭe, finfine rekomencas paroli, kaj tiam klarigas, ekzemple, ke ĝi decidis silenti, ĉar oni tro mokas ĝin kaj tio estas neelportebla. Pli bone nenion diri ol veki ridojn kaj senti sin humiligata. Tio povas okazi, ekzemple, ĉe infano, kiu balbutas.

Mia hipotezo pri socidevena afazio estas, ke io simila agas en la tutmonda socio. Verŝajne vi ne kredos min. Nefakulo ofte ne kapablas imagi, kiel forta povas esti nekonscia decido. Ne-

fakulo ofte eĉ ne vere komprenas, ke ekzistas gravaj nekonsciaj procezoj en la psiko. Sed egale, ĉu oni kredas aŭ ne, tiuj procezoj ekzistas, kaj ili ekzistas ankaŭ je socia skalo. Mia hipotezo estas, ke la homaro ne kuracas sin el socidevena afazio, ĉar ĝi timas tion fari. Sed tiu timo estas nekonscia.

Por iu kun psikanaliza trejniĝo, kiu vizitas la interretajn forumojn, en kiuj diskutiĝas lingvaj problemoj, tio estas evidenta. Kio estas okulfrapa pri tiuj forumoj, tio estas la fakto, ke kiam iu proponas Esperanton, kio relative ofte okazas, tuj aperas serio da kritikoj kaj rebatoj, ofte tute insultaj. Kaj estas klare kompreneble el la argumentoj de tiuj kontraŭuloj, ke ili scias nenion pri Esperanto, pri tio, kiel ĝi funkcias, pri tio, kiel ĝi aspektas kompare kun la angla aŭ aliaj sistemoj kiel multlingvismo aŭ tradukado kaj interpretado, ktp. Tiuj kontraŭuloj scias nenion, neniam diras: «Mi informiĝos kaj post kiam mi estos informita mi difinos mian starpunkton», ili simple diras: «Estas stulte», «Esperanto neniam sukcesos», «Ĉiuj parolos Esperanton en maniero kiu igos, ke homoj ne sukcesos kompreni sin reciproke», «Esperanto estas utopio», ktp ktp. Neniam faktoj, neniam dokumentoj, neniam kontroleblaj datumoj, neniam komparaĵoj. Nur senbazaj asertoj. Aŭ pli ĝuste asertoj sen racia aŭ objektiva bazo, sed kun bazo forte emocia. Se ne estus tiu emocia bazo, la frazoj estus serenaj, trankvilaj, respektaj por la alia vidpunkto. Sed tiaj ili tute ne estas.

Kiam oni vizitadas tiajn forumojn kaj legas tiujn tiel ofte akre malestimajn respondojn al la propono uzi Esperanton, kaj kiam oni havis psikanalizon trejniĝon, oni tuj povas konkludi: «Tiuj tre forte emociaj kaj atakaj

reagoj signas reziston al io terure timiga.»

Estas granda diferenco, en tiuj forumoj, inter la forte emociaj mesaĝoj de homoj, kiuj kontraŭas Esperanton, kaj la kelkfoje forte emociaj mesaĝoj de esperantistoj. Ankaŭ de tempo al tempo – klare malpli ofte, sed tamen – aperas reagoj de esperantistoj kun tre forta vibra emocia fono. Sed ne temas pri la sama emocio. La emocio en esperantistaj mesaĝoj estas kolero aŭ indigno, ĝi neniam estas timo. Kolero pri tio, ke oni aĉe parolas pri nia lingvo sen iam ajn bazi sian sintenon sur reala scio, sperto aŭ eĉ objektiva informiĝo. Kolero pri tiu konstante renkontanta kontraŭstaro al io, kio, por ni, tute evidente, estas bona, kaj malutila al neniuj. Indigno pri la maljusteco, kiun favoras la ĝenerala uzo de la angla, aŭ la maljusteco ne rigardi honeste al Esperanto antaŭ ol komenti pri ĝi.

Sed la mesaĝoj kontraŭesperantaj manifestas alian fonton de emocio. Ili atakas, sed ili atakas, ne pro kolero, ne pro indigno, ne pro strebado al justeco, sed, senteble, pro timo. Ĉe multaj bestoj, timo estigas agresemon. Kaj homoj, fundfunde, estas bestoj kaj reagas beste.

Kial homoj timas liberigi sin el socidevena afazio? Verŝajne temas pri tre kompleksa afero, en kiu multaj faktoroj interplektiĝas kaj kunagas. Eble la plej grava timo estas perdi la protekton de la tribo. Mia tribo havas sian lingvon, kiu distingas ĝin de aliaj triboj. Kaj mia tribo protektas min, en ĝi ni estas solidaraj, helpas unu la aliajn, komprenas nin reciproke. Tiu alia tribo estas tute malsama. Ili havas strangajn kutimojn, strangajn manierojn kondukti, strangan manieron pensi. Eble ili ĵaluzas nin, ĉar ili sentas ke ni

estas superaj. Ni ja estas la plej bonaj, la plej belaj, la plej inteligentaj, la plej saĝaj, ĉu ne? Tio estas evidenta. Se ili ĵaluzas nin, ili estas minaco por ni, ili volos preni niajn trezorojn, aŭ simple elimini nin por ĉesi havi antaŭ la okuloj homojn, kiuj superas ilin, ion por ili neelporblan.

Funde de la psiko, rilati kiel egaluloj kun homoj el alia tribo, el alia popolo, el alia kulturo estas sentata kiel io tre danĝera. Ĉiu gento ja opinias, ke ĝi pravus koncerne la manieron konduti, la mondkoncepton, la aranĝon de la socio ktp. Rekte, senpere kontakti alian genton, tio estas riski devi pridubi tiujn bazajn ideojn pri ni kaj pri ili. Imagu! Se la sovaĝuloj estus, ne ili, sed ni! Malkovri tion estus tro skue al nia pensmaniero, al nia maniero vivi. Pli bone aranĝi la aferojn tiamaniere, ke ni ne risku devi fronti al tute alia maniero percepti la vivon, al referenco, al kiu ni povus kompari nin. Kaj rifuzi rekte kompreni, kion diras la aliaj, estas bona

metodo. La homaro do aplikas pri lingva komunikado sistemon, kiu garantias, ke la afazio, kiun oni spertas tuj, kiam oni rilatas kun aliaj popoloj, aliaj landoj, aliaj kulturoj, neniam estos kuracita. Oni do povus klasi tiun socidevenan afazion inter la defendmekanismojn de la «mio» (egoo) aŭ, ĉar ĝenerale temas pri tuta popolo, de la «nio».

Komprenu min bone. Mi ne asertas, ke la homaro ĉiam rifuzos sanigi sin, liberigi sin el la socidevena afazio. Male, mi ne dubas, ke la tempo rapide proksimiĝas, kiam ĝi komprenos sian eraron, ĝi komprenos, ke indas riski aliri la aferojn fronte kaj lerni malkovri la aliajn popolojn. Tio certe okazos, kaj multaj signoj indikas, ke la homaro pli kaj pli proksimiĝas al tiu granda paŝo. Sed tia resaniĝo postulas tempon. Kaj la plej bona metodo por konservi en si malsanon, kiu protektas nin, estas nei, ke ĝi ekzistas, ke ĝi estas malsano kaj ke tiun malsanon eblas facile kuraci.

Bona svisa vino al la fino

- *Ed Borsboom recenzas:*

Andreas Künzli, Universalaj Lingvoj en Svislando, SES kaj CDELI, La Chaux-de-Fonds 2006, 1129 paĝoj.

Fine de 2006 aperis «Universalaj Lingvoj» en Svislando de la relative juna slavisto Andy Künzli el Bern. La titolo iom miskondukas la legonton, ĉar tiu pensas pri enhavo en la maniero de ekzemple «Historio de la Mondo-lingvo» de Ernest Drezen. Sed ne, la svisa verko estas tute alia. Post foliumado evidentiĝas, ke ĝi estas precipe enciklopedio pri la esperanta vivo en

Svisio kune kun, ni diru, aneksaĵoj pri la planlingvaj projektoj Volapük, Ido, Occidental, Interlingua.

La komenco de la libro, 146 paĝoj, konsistas el enkondukaj, ofte fascinaj artikoloj de diversaj aŭtoroj: Graf, Gacond, Künzli, Piron, Carlevaro, Baur alterne en la lingvoj esperanta, franca, angla, germana, itala, retoromanĉa. Malantaŭe troviĝas la kutimaj ĉapitroj, 122 paĝoj, kun resumo, fontoj, bibliografio, nomindekso.

La meza parto tamen liveras en formo de laŭ-alfabeta enciklopedio la svisan esperantan historion ĝis hodiaŭ. Tio lasta signifas ekstreme valoran elemen

ton por nia historiografio, ĉar mankas en Esperantio libroforme aktualaj sciigoj pri homoj kaj aferoj. Jam el tiu vidpunkto mi konsideras la gigantan redaktaĵon de Künzli grava kaj utiliga.

Volonte mi donas komentojn pri tiu ĉi ĉefaĵo, la enciklopedio, ampleksanta 608 paĝojn. Ĝi bonege uzeblas kaj priskribas ne nur samideanojn, sed ankaŭ multajn objekt-nomojn. Kapvortoj ekzemple de ne-personoj: Civito, ekzamenoj, gazetaro, ILEI-sekcio, KCE, literaturo, kaj el la geografia branĉo urboj kaj ĉiuj kantonoj. Mallonge: kiel tio konvenas en tradicia enciklopedio.

Unue mi plukadis el la proksimume 500 biografietoj kaj konstatis, ke ili estas redaktitaj en klara kaj preciza lingvaĵo kaj laŭ enhavo fiksitaj objekte kaj sen privata juĝo. Unu specimeno por veki la apetiton. Pro tio, ke mi ĉirkaŭflaris la poezion de la klera esperantologo Henri Vatré, mi prezentas la tekston pri la edzino.

Juliette Vatré-Baudin (1910-1937)

Ankaŭ la unua edzino de Henri Vatré, Juliette Baudin, kiu lernis Eon en 1930, estis Eo-poetino. Dum kelkaj jaroj la ĝeneva kudristino laboris kiel oficistino en la Internacia Centra Komitato de la Eo-movado (ICK). En Ĝenevo ŝi estis inter la kunfondintoj de la ĝeneva EG Zamenhof kaj 1933-1935 gvidis Cseh-kursojn en diversaj nederlandaj urboj. Ŝi verkis originalajn poemojn, de kiuj kelkaj aperis en la libro «Naŭ Poetoj» (Iltis 1989), krome ŝi tradukis multajn poemojn el la franca kaj el la itala lingvoj, el kiuj kelkaj aperis en «Literatura Mondo» (dua periodo).

Ŝajnas al mi, ke en tia manlibro devus reliefigi la valoro de la priskribito. Ekzemple en la nederlanda enciklopedio WP la unua frazo sub «Rem-

brandt» tekstas: «*Unu el la grandmajstroj de la monda pentro-arto.*» Imagu, se tie anstataŭe starus: «*Nederlanda pentristo el la 17-a jarcento.*» Tute senerare, sed la unua metus min tuj sur la deziritan spuron. Sekve uzanto ricevas «neŭtralajn» faktojn. Ekzemple pri la fenomeno «Civito esperanta» la redaktoro ĉerpis el la broŝuroj, publikigitaj de la adeptoj de tiu civito. Flankajn rimarkojn: laŭ mia gusto tro longa: 8 paĝoj; kaj forestas alia voĉo pri tiu institucio. Sub «radio», trafa 5-paĝa kompendio, aperas la radio-kompania motivo, ke en 1991-1992 «*fone de nova financa premo ĝi devis ĉesigi la esperantajn elsendojn.*» Feliĉe ĉe la fino Silber estas citita. Laŭ li esenca kialo de la ĉesigo estis, ke «*ĝis 1991 al Svisa Radio interesis la orienteŭropa merkato, ekde 1992 ne plu.*» Eble nur noteto, sed necesa por akiri netan konon.

En «Vivo de Andreo Cseh» mi vivigis kelkajn svisojn, ligitajn al Cseh. Por aldoni vivdetalojn en la tiu-libra indekso, mi serĉis ĉe Künzli. Sed ho, ve, ne ĉiuj estis enmetitaj. Jes, famuloj kiel Bovet, Gacond, Hodler, Jakob, Privat estas reprezentitaj. Sed mi vane serĉis la iniciatintojn de Pestalozzi-projekto post la dua mondmilito, Anuta kaj Walter Corti el Zürich. Serĉi en tiu ĉi kazo vere postulas energion. Mi rigardis en la indekso, ne. Sub Corti, ne. Sub Pestalozzi, ne. Sub Zuriko (Zürich), la paro devenas el tiu urbo, ne. Ĉiam nul mencio! Alice Früh paradas en la indekso, sed malestas sub Früh en la enciklopedio. Hura, mi renkontis ŝin sub St.Gallen, ĉar tie ŝi naskiĝis. Ŝia esperanta amikino Anahide Nercessian el Ĝenevo havis kompletan malbonŝancon. Kaj kie subakviĝis Alice Müller-Noget (ĉu Muller aŭ

Müller?), la motoro de la movado en Vallorbe? Mi vidis ŝiajn du portretojn ie en kolumno, sed ne povis trovi. La sindona, modela peranto por Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Luise Riedle el Zürich, ne ricevis mencion, same kiel John Robertson el Bern, kuraĝe korespondante kun Cseh ankorau en 1941.

Kontraŭe al tiu minuso sursceniĝas la pluso de centoj da prilumigitoj. La demando leviĝas, laŭ kiaj normoj eniras iu en la kolekton? Kun miro mi vidis mian TEJO-kompanion Max Abegg, en la 50-aj jaroj iom aktiva ĉe la junularo. Depost 1960 li nur staras en la jarlibro de UEA. Li ricevis 16-linian paragrafon plus foton. Grandskale asignita!

Cetere ne nur svisoj eniris, sed ankaŭ eksterlandanoj, funkciantaj dum certa periodo por nia lingvo en Helvetia Konfederacio. Jakob, Kreuz, Stojan, Henriko Fischer, prave, ĉar ili grave kontribuis al la ekzisto de Esperanto en la mondo. Ĉu vere la rumano Fischer projektis «E-o Triumfontan»? Kaj anstataŭ «*Lia kondamno fare de naci-socialistoj*» mi uzus «fare de faŝistoj». Ke lia edzino ankaŭ blindiĝis, mi neniam aŭdis. Menciindas la kazo de la polo Tomaz Ĉmielik, al kiu pro sia tradukado de preskaŭ la tuta verkaro de Dürrenmatt malfermiĝis la paĝoj. En tiu korifearo Andreo Cseh havu ankaŭ sian lokon, laborante ĉe UEA en la ĉefsidejo de Ĝenevo kaj poste li entreprenis por UEA propagandan rondvojaĝon tra Eŭropo. Ni ne forgesu liajn instruadon kaj prelegojn en kelkaj kantonoj antaŭ kaj post la dua mondmilito.

Ankaŭ ne lia dumviva amikeco kun Privat. Tiu ĉi fariĝis prezidanto de Universala Ligo, kreita de Cseh. La peda-

gogo estis pli ol cent fojojn nomita ĉie tra la volumo, sed la redaktoro ne rangigis lin en la kapvortoj aŭ indekso.

Künzli promesis la pretigon de aparta superrigardo, en kiu ĉiu nomo estos presita kun koncernaj paĝciferoj. La oportunaĵon oni ĝis nun ne povis kompili.

Mallongan ekskurson mi faris al la ĉapitro pri Occidental. En ĝia 1,5-paĝa historio ne estas pritraktita la hontiga konduto, i.a. de f-ino Meierhofer, rilate la Pestalozzi-projekton en 1947. La occidentalisto Fritz Haas akiris biografieton, sed sen tuŝo de liaj broŝuroj de la tipo «Wieso ist Occidental die endgültige Welthilfssprache?»

Per tiaj alineoj pri ne aŭ duone trovitaj eroj mi nepre ne volas bagateligi la riĉon de la enhavo, sed nur plenigi manplendon da truetoj, ĉerpante el a) la leterarĥivo de IEI, b) «Vivo de Andreo Cseh», c) «Vortoj de Andreo Cseh».

Legante en la trezoro, ĝi elvokas antaŭ mi pecojn el la esperanta historio kaj ankaŭ miajn aventurojn kun kursanoj speciale dum miaj instru-semajnoj en La Chaux-de-Fonds en la 80-aj jaroj, tiam sub eminenta gvido de Claude Gacond. Ili reaperas per trafaj karakterizoj kaj bildoj, ofte eĉ pluraj de unu individuo, nome juna kaj aĝa, kaj en diversaj pozoj. Pri la nemalhavebla fotografio por ni verdsteluloj mi jam skribis en alia recenzo, argumentante, ke pro nia globa vivado kun relative rara persona kontakto «*ni volas vidi (!) nian diligentan kolegaron*». Tio nun realiĝis dank' al Künzli.

Antaŭe mi pensis, ke tia verko havas sian nuran konforman lokon en bibliotekoj kaj sur la tablo de historiistoj. Nun post trastudo mi reviziis mian starpunkton. Pro ĝia mult-aspekteco ĝi

vere estu konsultilo por ĉiu iom serioza esperantisto.


Dum la lasta fazo de la preparo la redaktoro provizis «Universalaj Lingvoj en Svislando»-n per antologio en dek unu subĉapitroj dise tra la prozo. Per ili oni gustumas atentindajn ese-tojn de la herooj el nia pasinteco kaj estanteco. Li verŝajne intencis prezenti divers-opinian panoramon super la movado. Sekve de tio la tuto ŝvelis al 1129 paĝoj.

Mi respektive riverencas antaŭ la kun-labora stabo, ĉefe Andy Künzli, kiu baraktis ekde 1992 super la materialo kaj oferis milojn da horoj kaj eĉ pli ol

nur tempo sur la kultura altaro de Esperanto. Kaj kun kiaj ĝuindaj fruktoj!

Pri unu ideo Andy kaj mi ne akordas. La sviso iom pesimisme taksas la estonton de nia lingvo, li klinas la orelon al tiuj, kiuj kredas, ke ĝi vivas nur ĝis la jaro 2045. Male, mi cent-procente defendas la vidpunkton, ke Esperanto pro sia diasporeco ne plu povos malaperi. Sed pri la ne nun difin-ebla evoluo certe raportos la dua eldono de «Universalaj Lingvoj en Svislando».

(Nederlando, julio 2007-08-08.)



Historia dokumento

TEJO-Kongreso 1958 en Homburg, Germanio.

De dekstre : **Max Abegg** el Svisujo, **Kerstin Olsson** el Svedio, **Ed Borsboom** el Nederlando, **Lucien Pietri** el Maroko

Kiel trovi ion en informadika CDELI-katalogo ?

Dua parto

(La unua parto aperis en *SES informas* 2007-2)

Ni restu en "recherche simple" (simpla serĉo), sed ni rigardu iom pli suben. ("parcourir un index" : serĉo laŭ la indeksoj). Tio estas tre utila, se vi ekzemple interesiĝas precize pri iu aŭtoro (aŭ pri iu titolo).

Ekzemple ni prenu kelkajn aŭtorojn :

1°/ *Zamenhof, Lejzer Ludwik* : 130 respondoj.

(Estas iom multe kaj iom longe por trarigardi ĉiujn titolojn, sed dependas de via intereso...)

2°/ *Tell, Leander* : 2 respondoj.

3°/ *Paasilinna, Arto* : 17 respondoj.

Se ni trarigardas tiujn 17 respondojn, ni konstatas, ke neniun verko estas en esperanto kaj neniun en CDELI.

Tion ni estus povintaj scii tuj uzante la metodon de la pasinta fojo, tio estas, skribi la du vortojn *Paasilinna* kaj *cdeli* en la kadro 1, ni estus ricevintaj la respondon 0 :

aŭ : 0 respondo.

Sed iom post iom ni spertiĝas(os) kaj laŭbezone elektas(os) la pli trafan metodon...

Se vi ŝatus ekzerciĝi ankaŭ kun titoloj, ne forgesu depreni la artikolon.

Ekzemple : *La dia avarulo* estas *dia avarulo* kaj eble sufiĉus indiki *dia ava* aŭ eĉ *dia a* (dependas de la ofteco de la unuaj vortoj).

Ĝis la venonta numero por iom pli...

Martine Schneller

martine.schneller@ne.ch

Novan ekzercon vi malkovros en *SES informas* 2007-4.

4 senpagaj libroj por bibliotekoj de esperanto-societoj.

Se via esperanto-societo ne posedas la sekvajn librojn, petu la mankantajn titolojn ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando, kaj vi ricevos ilin senpage.

Titoloj de la 4 libroj

**Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga - La joko de nutrado - Espero por la mondo :
spirita galvanoplastiko - Sub la regno de la kolombo : paco regu.**

Temas pri plibonigo de nia vivo dum rilatoj, nutrado, ktp. Aŭtoro : O. M. Aïvanhov.
Esperantigo de Claude Piron. Por detalaj klarigoj vidu :

http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html



Svisa kalendaro

Septembre

- 1 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Konferenco-tago : Reinhard Haupenthal prelegos pri la vivo, verkaro kaj agado de Johann Martin Schleyer.
3 : Lausanne : LES : Kunveno kun Fr. Randin
5 : Wil : EKW : Kunveno.
12 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
17 : Basel : Manĝa vespero ĉe Béroud-Focke.
22 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Oktobre

- 1 : Lausanne : LES : Kunveno kun Cl. Gacond.
6 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
10 : Luzern : LES : Kunveno.
20 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
25 : Basel : ESB : Kunveno.
26 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Grupa kunveno.

Novembre

- 3 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
5 : Lausanne : LES : Kunveno kun Schönibartoli.
7 : Wil : EKW : Kunveno.
10 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Grupa kunveno.
14 : Luzern : LES : Konversacia rondo.

- 17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
22 : Basel : ESB : Kunveno

Decembre

- 1 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
5 : Wil : EKW : Fondua vespero.
7 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Grupa kunveno.
12 : Luzern : LES : Kunveno.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
15 : Basel : ESB : Zamenhofa festo en Francio.
15 : Lausanne : Zamenhofa festo.

2008 Januare

- 9 : Luzern : Konversacia rondo.
9 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Grupa kunveno.
19 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Februare

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
6 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
13 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Grupa kunveno.

Marte

- 12 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Grupa kunveno.
15 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.

Venonta redakta datlimo de *SES informas*: Oktobre 15

La gvidantoj de la lokaj kaj fakaj societoj bonvolu atenti pri la venonta datlimo redakcia por la periodo oktobra-decembra de la venonta *SES informas* 2007-4, kiu aperos komence de novembro. Ili informu pri la datoj de la kunvenoj por la monatoj novembro, decembro kaj januaro 2008. Se la redakcio de *SES informas* ne estos ricevinta informon, tiam esprimiĝos bedaŭro pri tio. Kiam pro daŭra neinformado eliminata organizaĵo ree atestos pri sia reala ekzisto per akurata sendo de vivraporto, tiam ĝi remenciĝos. Ni konstatas, ke multaj esperanto-organizaĵoj rilatas al nia bulteno *SES informas*, kiel ili fakte plej ofte rilatas kun la aliaj nacilingvaj redakcioj gazetaraj, radiaj kaj televidaj. Kiom da lokaj grupoj kaj fakaj societoj regule sendas sian informilon aŭ raporton al la redakcioj de la gazetoj, radioj kaj televido de sia regiono? Certe malmultaj. Bedaŭrinde samas por la rilatoj kun la redakcio de *SES informas*. Tio nepre ŝanĝiĝu al pli pozitiva kaj racia sinteno. Esperplene Claude Gacond